

THE BRITISH ESPERANTIST

with which is incorporated




"International Language"

56th Year, No. 654

PRICE - ONE SHILLING
or Ten Shillings per year, post free

February, 1960



By permission of Bournemouth Evening Echo

La Urbestro de Bournemouth, Ĉefkonsilanto L. V. Barney, J.P., sidas sur la benko, kiun li ĵus akceptis kiel donacon de lokaj Esperantistoj al la Lower Pleasure Gardens. Apud li S-ino W. Laurie; malantaue S-ro A. H. Middlemast kaj S-ro E. J. Laurie (dekstre).

The British Esperantist

Publishers:

THE BRITISH ESPERANTO
ASSOCIATION, INC.
140, Holland Park Ave.
London, W.11

Editor:

D. B. GREGOR, M.A., L.B.E.A.
27, Rushmere Road
Northampton

Contributions should be type-written, in double spacing, and sent in by the 20th of the month previous to publication. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

Advertisements: £3 per page and pro rata to one-eighth.

CONTENTS

	<i>paĝo</i>
La tasko de niaj societoj ..	197
44th British Esperanto Congress ..	198
Esperanto en la brita gazetaro ..	199
Notoj pri la Esperanta literaturo <i>R. Rossetti</i> ..	200
S-ro H. G. Toms en Bulgarujo ..	201
Translation Competition ..	202
Zamenhofa Renkontiĝo de la J.E.B.	203
Martha Amy Butler. <i>M. C. Butler</i>	204
From Far and Near	205
Lingva Angulo. <i>C. D. A. Capp</i> ..	208
Novaj Libroj	209
El nia Leterkesto	210
Official Notices	211
Mortoj	211
Krucvort-enigmo. <i>A. D. Cook</i> ..	212

15 originalaj dramoj kaj skeĉoj. Taŭga teatra materialo kaj bonega studobjekto por daŭrigaj kursoj kaj lingva praktikado



Prezo 15 ŝil.

Afranko 9p.

Mendu ĉe B.E.A.

The British Esperantist

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

56TH YEAR, No. 654

FEBRUARY, 1960

LA TASKO DE NIAJ SOCIETOJ

“Hodiaŭ la tasko de niaj societoj estas helpi per ĉiuj fortoj oficialigi la Internacian Lingvon. Por ke niaj societoj povu plenumi tiun taskon ili devas esti (a) organize fortaj, (b) lingve kapablaj, (c) kulture altnivelaj. Nur organize fortaj societoj povas havi influon ĉe lokaj gazetoj, povas bone prizorgi la informan servon, povas enpenetri la lernejojn, povas per bonaj argumentoj prezenti al la lokaj aŭtoritatoj la gravecon de Esperanto. Organiza forto konsistas el: bona komitato kiu regule kunvenas; bona sekretario kiu zorgas pri la administraj laboroj kaj la societa vivo; komisiitoj en la komitato por junularo, turismo, propagando. Lingve kapablaj estas la societoj en kies vico troviĝas Esperantistoj bone regantaj la lingvon kaj kiuj daŭre organizas kursojn kaj gvidas ilin. Kulture altnivelaj estas la societoj kiuj daŭre organizas prelegojn pri diversaj temoj el scienco kaj arto. Ili devus esti kiel popolaj universitatoj en malpli granda skalo, simile al la W.E.A. kursoj.”

Ni ĉerpas ĉi tiujn vortojn el Bulteno N-ro 135 de la Federacio de Lancashire kaj Cheshire. Estas evidente, ke dum la Zamenhof-jaro ĉiuj grupoj streĉis siajn fortojn, energiajn kaj monajn, por festi la datrevenon tiamaniere, ke la atento de kiel eble plej multaj homoj estu altirita al Esperanto. Notinde tiurilate estas, ke la sukceso aŭ efiko de la agado tute ne dependis de la multnombreco de la grupo; atestu ekzemple tiu de South Shields, kies ses membroj aranĝis en la loka Biblioteko ekspozicion, kiun vidis laŭtakse 1500 personoj.

Pri la aktiveco de la grupoj oni ekhavas ideon, legante la jenajn erojn el kelkaj programoj lastatempe ricevitaj en la Oficejo:—

Huddersfield

March 2—Surpriz-paperoj. 16—La Sekretario parolos. 30—S-ro Beaumont invitos siajn studentojn al la grupo. April 13—“Bagatelo”: S-ino Thewlis.

London

March 4—Grekujo (kun lumbildoj), D-ro Mildwurf. 11—Ŝercoj kaj Ludoj: La Membroj. 18—Filmo pri Hiroshima, F-ino Paraige. 25—De Miaj Librobretoj, Nora Holmes. April 1—Memoroj 1903–1908, Harry A. Epton. 8—La Tria Mondlingvo, E. Ockey.

Manchester

March 7—Sarkoj, S-ro W. W. Borrow. 14—Ŝaradoj. 21—Debato: Enkondukos S-ro E. Revill. 28—Aferkunsido. April 4—Poezia Vespero: Ĉiu kunportu poemon por laŭtleĝo.

Newcastle upon Tyne

March 1—Cine Films, C. E. Willits. 8—Memorindaj Okazintajoj, G. Curran. 15—Ĉu Esperantigi Lokajn Nomojn, debato. 22—Strangaj Rakontoj, Louise E. Cant. 29—Literatura Vespero, Margaret Kennedy, M.A. April 5—Dum Fuma Regalo, Ewart Young.

Nottingham

March 10—Whist Drive. 24—Heraldiko: H. Fillingham. April 7—Inter la Floroj (lumbildoj), G. R. Newman.

Sutton, Surrey

March 2—Vivanta Gazeto. 9—Komedio de Eraroj en Aŭstrujo. 16—Jarkunveno. 23—La Venonta Programo. 30—Daŭrigu la Rakonton. April 6—Magnetofona Vespero.

Leicester

February 24—Novaj Ludoj, D. S. Broughton. March 9—Floroj tra la Kamera Lenso, G. R. Newman. March 23—Abeloj, R. H. Fletcher. April 6—Kunveno ĉe S-ino Cross.

44th British Esperanto Congress

Harrogate, Whitsuntide 1960

Congress Lunch: Owing to the limited accommodation in the Sun Pavilion, we are compelled to restrict the Congress Lunch to 150. Will those who intend to partake please enrol as early as possible.

Addition to Programme: The Congress Committee are pleased to announce that Prof. Dr. Ivo Lapenna, General Secretary of U.E.A. and Honorary Director of the Research and Documentation Centre, has agreed to address the Congress. The subject of Dr. Lapenna's talk, which will probably be given on the Sunday evening, is not known at present, but those who have previously heard Dr. Lapenna speak will not need to be told that it will be interesting, eloquent, and, in short, a "must" for all Congress members.

Yorkshire Dales Excursion: This excursion has been altered to cover more interesting and more scenic country. The route will now be via Kettlewell and Aysgarth, and will also include Richmond and Jervaulx Abbey. Will anyone who booked the

original excursion and does not now wish to take part, please write to the Congress Treasurer.

Britain's Floral Resort: Claiming this title, Harrogate is indeed the ideal place for a Whitsuntide holiday, so you need have no hesitation in bringing a Non-Esperantist friend or relative to the Congress with you. Even if they fail to be infected by the enthusiasm, they will be able to enjoy the amusements listed in the November "B.E."

Enrolments: Further supplies of enrolment forms may be obtained from the Congress Secretary, Miss A. Duerden, 1, Grove House Drive, Bradford, 2. Please note that a higher Congress Fee is payable with enrolment forms received after 31st March, so it is in your own interest to enrol early.

E. P. Crabtree.

Congress Members (to 8th January)

1. S-ro P. Crabtree, Huddersfield
2. S-ro A. Edmondson, Bingley
3. S-ino E. Edmondson, Bingley
4. F-ino A. B. Duerden, Bradford
5. F-ino M. Gill, Bradford
6. S-ro J. Sykes, Halifax
7. S-ro Challenger, Leeds
8. S-ro B. B. Beaumont, Huddersfield
9. S-ro K. Duerden, Bradford
10. S-ro H. W. Holmes, London
11. S-ino N. Holmes, London
12. S-ro D. Kennedy, Bishop Auckland

13. S-ino M. Kennedy, Bishop Auckland
14. F-ino O. Robotham, Stockton-on-Tees
15. S-ro R. L. Danes, Bournemouth
16. S-ino A. L. Danes, Bournemouth
17. S-ino F. W. White
(Prezidantino, B.E.A.)
18. (Honora Sekretario de B.E.A.)
19. (Honora Kasisto de B.E.A.)
20. S-ro J. W. Leslie (Sekretario, B.E.A.)
21. S-ro W. M. Goodes, Hornchurch
22. S-ro T. W. Bowyer, Huddersfield
23. S-ro J. V. Midgley, Bradford
24. S-ro N. Townson, Bradford
25. S-ino P. Townson, Bradford
26. F-ino M. Miller, Bradford
27. S-ino M. Walker, Leeds
28. F-ino E. Pearson, York
29. F-ino M. Kaye, Huddersfield
30. F-ino M. W. Gee, Huddersfield
31. S-ino F. Merrill, Llandudno
32. F-ino M. Boulton, Hexham
33. S-ro B. McGrath, Manchester
34. S-ino H. McGrath, Manchester
35. S-ro C. Bardsley, Oldham
36. S-ro P. Basten, Surbiton
37. S-ro J. D. Applebaum, Sheffield
38. S-ino C. Applebaum, Sheffield
39. S-ro Guy B. Tordoff, Bristol
40. S-ino B. B. Beaumont, Huddersfield
41. F-ino D. Beaumont, Huddersfield
42. S-ro A. Mulligan, Nelson
43. S-ro L. I. Gentle, Whetstone, N.20
44. S-ro L. W. Edwards, Watford
45. S-ino L. W. Edwards, Watford
46. S-ro H. W. Allen-Smith, Watford
47. S-ino E. M. Allen-Smith, Watford
48. S-ro S. Saft, Salford
49. S-ro R. W. Hamilton, Hemsworth
50. S-ro A. H. Middlemast, Bournemouth
51. S-ino Middlemast, Bournemouth
52. F-ino M. Clarke,
Newcastle-upon-Tyne, 3
53. S-ro S. Curran, Pickering
54. S-ino J. Curran, Pickering
55. S-ino F. K. Pilling, Poulton-le-Fylde
56. F-ino F. Pilling, Poulton-le-Fylde
57. F-ino M. Kennedy, Glasgow, W.2
58. S-ro N. H. Naylor, Bradford
59. S-ino R. Naylor, Bradford
60. F-ino A. M. Miller, Pudsey
61. F-ino M. Harwood, Bradford
62. S-ro F. Parker, Burnley
63. S-ino E. Parker, Burnley
64. F-ino I. Tunstall, Watford
65. S-ro H. Jackson, Watford
66. S-ro M. Lewin, Dunstable
67. S-ino E. Lewin, Dunstable
68. F-ino V. C. Nixon, Birmingham, 30
69. S-ro S. J. Smith, High Wycombe
70. S-ino I. Smith, High Wycombe

Esperanto en la brita gazetaro

Newcastle-on-Tyne Evening Chronicle, 12 Dec., 1959: The English Speaking Union is ready to debate any subject, including Esperanto.

Universe, 18 Dec. 1959: "Tales told by a Squirrel" is now available in Braille for Esperantist children.

Bristol Observer, 18 Dec. 1959: Mr. Rossetti's talk to Bristol Rotarians.

Schoolmaster, 8 Jan. 1960: Two motions for Annual Conference of N.U.T. recommending Esperanto in schools and in the G.C.E.

The Crosby Herald, 24 Dec. 1959: Mr. D. H. Witley's long article on the "Centenary of a gentle genius".

Nottingham Evening News, 14 Dec. 1959: Advertisements and descriptions of Exhibition of Esperanto literature in the Central Library. 5 Jan. 1960: Mr. K. Coleman appeals for enrolments in new class.

Hexham Courant, 25 Dec. 1959: The meeting of the local group when the programme was recorded and sent to Finland.

Letchworth Citizen, 1 Jan. 1960: Mr. N. Smith's address at the Settlement on the life of Zamenhof. It was suggested that as Zamenhof had visited Letchworth in 1907 after the U.K. in Cambridge, a road might well be named "Zamenhof" after him.

Colne Times, 1 Jan. 1960: The Esperantist career of the late Mr. F. Willan.

West Briton, 4 Jan. 1960: Mr. H. R. Tonkin points out that Esperanto is flourishing even if the Truro and District Group is not what it was 50 years ago.

DONATIONS TO THE B.E.A. LIBRARY to 1 February

B. B. Beaumont, 15s. 9d.; Miss K. Clamp, 5s.; L. Hartridge, 10s.; K. Masterman, 10s.; Mrs. E. G. Steele, 15s.; Miss Sawyer, 10s.; A. Venture, 7s. 6d. Huddersfield Esp-Society, autograph letter from Zamenhof; Miss M. M. Duncan, photos; F. W. Hipsley, books. Very sincere thanks to all.

Thirty volumes of magazines now await the binder. But £15 more is needed before they can be sent to him.

M. C. Butler.

Notoj pri la Esperanta literaturo

Esperanto naskiĝis en poezio. En la *Unua Libro* jam troviĝis du originalaj poemoj: *Mia penso kaj Ho, mia kor! Mia penso*, kun siaj emociŝanĝoj de strofo al strofo: malgajo, ĉagreno, abnegacio, ribelemo kaj angoro estas mirinda demonstracio pri la sentesprimaj kapabloj de la nova lingvo.

Same senpera kaj elokventa estis la proza lingvo. Jam la Antaŭparolo al la *Dua libro* (1888) kaj la unuaj artikoloj en *La Esperantisto* (1889) havas plenan spiriton kaj adekvatecon de esprimado. La artikolo *Pseŭdo-esperantistoj* el 1893 (*Originala verkaro*, p. 180) jam perfekte esprimas indignon kaj ironion—kaj ĉi tiu estas unu el la plej malfacile komunikeblaj retorikaj figuroj, precipe en preso, kaj precipe al multnacia publiko.

Zamenhof spertis, pretigante sian lingvon, ke sen la originala stilo neniam tradukado estas ebla, ĉar ne ekzistus idiomo, en kiun oni tradukus. Zamenhof antaŭ ĉio kreis tiun originalan idiomon. Paroli pri la Esperanta literaturo, kvazaŭ ĝi konsistis unuavice el tradukoj, estas lingvistika absurdajo.

Post nur ses jaroj Esperanto estis sufiĉe matura por entrepreni grandan traduktaskon. En 1893 Zamenhof tradukis *Hamleton*, unu el la plej kompleksaj kaj malfacilaj verkoj de la mondliteraturo (ĝi aperis en 1894). Tiu demonstraĉia traduko entuziasmigis la esperantistaron kaj solidigis la venkon super la reformistoj.

Kvankam Zamenhof konsultis la originalon, li laboris pliparte laŭ la germana Hamlet-traduko de Tieck-Schlegel. Tiu pionira esperantigo de Ŝekspira dramo estas ankoraŭ hodiaŭ ne superita. La bela traduko *Songö de someromeza nokto* (Louise Briggs) ne egalas ĝin, kaj la ceteraj ŝekspirtradukoj staras ankoraŭ pli malalte. La anglalingvaj tradukintoj havis "ĉion krom genio", la polo havis la genion.

Zamenhof signis la duan krizovenkon—tiun pri Ido—per alia poezia traduko: *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe. Tiun potence belan tradukon Zamenhof plenumis eksprese (dum proksimume ses semajnoj) por prezentado en la Dresdena Kongreso en 1908.

La plej granda poezia verko de Zamenhof estis la lingvo mem. Krom tio lia plej granda poezia verko estis la *Proverbaro Esperanta*: riĉa minejo de bildaj esprimoj kaj trafaj parolturnoj por ĉiuj, ĉu verkistoj aŭ simplaj parolantoj, kiuj deziras esprimi sin, ne nur seke kaj logike, sed ankaŭ kun iom da suko kaj koloro.

Kiam Grabowski montris al Zamenhof la parton de *Sinjoro Tadeo*, kiun li tradukis, Zamenhof trankvile diris: Traduku la tutajn. Grabowski opiniis tion neebla, sed... li daŭrigis kaj kompletigis tiun konsternan taskon. La rezulto estas, ke Esperanto konkeris nacian epopeon, kiun la angla lingvo ĝisnun ne sukcesis traduki versforme.

Zamenhof konstante entreprenis kuraĝajn traduktaskojn: dramojn, romanojn, la Malnovan Testamenton. En 1917 li anoncis en *British Esperantist*:

Mi serĉas Eldoniston!

"Mi deziras komenci sisteman tradukadon de diversaj plej famaj verkoj el la tutmonda literaturo. . . ."

Zamenhof estis tiam tre malsana je kormalsano, kaj baldaŭ poste li mortis, la 14-an de Aprilo, 1917.

R. Rossetti.

TRI ANGLOJ ALILANDE

I. S-ro H. G. Toms en Bulgarujo

Varna, ĉe la bordo de la Nigra Maro, estas la "Brajtn" de Bulgarujo. En la urbo jen Zamenhof-Strato : kaj en la strato aŭtobusa haltejo nomita "Esperanto". La klubejo staras en la ĉef-strato de la urbo kaj ĉiuvespere dum bela septembra semajno salutis min tie dudek ĝis tridek gekamaradoj.

Ĉe Plovdiv, la dua urbo de la lando, ĉe stratangulo jen alia pli granda Esperantista klubejo. En ĉiu vespero, somere, vintre, de la sesa ĝis la sepa horo S-ro Malĉev, maljuna pioniro, sidas tie por helpi komencantojn, konsili ilin pri la korespondado, kaj konversacii kun samideanoj, dum lia altprincipa filino, Stevka, kviete insistas, ke li uzu nur la internacian lingvon. Je mia vizito la anoj pardonpetis pro la stato de la ĉambro; oni riparis kaj refarbis la lokon. Mi petis pri la kosto. "Ne estas kosto," oni respondis, "La registaro rebonigas senpage." Levskigrad estas urbo en la fama Rozvalo. Tie la esperantistoj dividas belan ĉambron kun alia societo.

Eĉ en Borima vilaĝo, en la alta Balkanaro, la esperantistaro havas sian propran klubejon en angulo de la vendejo post fea ĝardeneto.

Ofte, neatendante, mi renkontis esperantistojn. Iu Tanef, ĵurnalisto el Sofio, irante en la koridoro de la vagonaro, ekvidis mian insignon kaj envenis la kupeon por enketi kaj kunparoli. Ĉe malgranda Vazograd en la poŝtoficejo oni prezentis min al la ĉefo. Flustris mia gvidanto, "Jen la kasisto de la loka esperantistaro".

Vojaĝante vagonare mi atingis la lastan stacion antaŭ Plovdiv. Kunulo en la kupeo informis, "Ĉi tie Staciestro Gerasimov estas delonge perfekta Esperantisto. En lia oficejo verda flago pendas ĉe la muro post ia seĝo."

Malgaja mi forlasis unu urbon. Mi kliniĝis el la vagonaro por manpremi karajn gekamaradojn. Subite post mi okazis ekkrio de surprizo, "Esperantisto li estas!" Jen du virinoj, kiuj rekonis la insignon. Post la ekiro de la vagonaro ili persiste enketis por si mem kaj por aliaj pasaĝeroj pri mia naskiĝloko, aĝo, profesio, ĉu mi havis filojn, filinon, genepojn.

Ni revenu al Varna. Mia unua bulgara korespondantino (mirinde aminda!) kondukis min tra nova kvartalo de la urbo. Trans la strato staris impona konstruaĵo kun larĝa elstara tegmentrando—domego de novaj apartamentoj. "Rigardu!" mi ekkriis, "ĉe la tria etaĝo!" Ŝi suprenrigardis. "Vere! La verda stelo!" Granda Esperanta flago pendis de alta verando. "Ni esploru!" mi hezite proponis. Ivanka konsentis. Do, ni transiris la straton, sed ĉe la stratangulo ni ekvidis tri homojn; ĉiu portis steleton. "Jen samideanoj!" Ni iome kunparolis kun ili kaj tiam ni ĉiuj decidis kune esplori la aferon de la Verda Flago ĉe la tria etaĝo. Ni eniris sub arkajon kaj supreniris per larĝa preskaŭ palaca ŝtuparo. Facile supren ni pasis, ĉar la ŝtupoj estis malaltaj. (Bonkora arkitekto anticipis viziton de maljunulo!) Ni atingis la trian, frapis ĉe pordo kaj eniris portempan loĝejon de fervora pola propagandisto. Post la freŝdata kongreso en Varsovio li nun vojaĝis tra Bulgarujo, vizitante lokajn societojn, disdonante folietojn kaj literaturon.

Antaŭ 50 jaroj, en Turnovo—antikva ĉefurbo laŭ formo de vasta amfiteatro etendiĝanta de rivero ĝis la fora ĉielo—urbo de dometoj arigitaj super dometoj, en tiu stranga

Turnovo dum la jaro 1907, fondiĝis la Bulgara Esperanta Asocio. Travivinte leviĝojn-malleviĝojn la asocio nun bone elfloras, kun multaj filioj tra la tuta lando. Por celebri la 50an datrevenon de la fondiĝo, la registaro en 1957 eldonis Zamenhofan poŝtmarkon kun portreto de la Majstro ĉe bildeto de la kurioza urbo. Ankaŭ en 1947, okaze de la 30a datreveno, specialan poŝtmarkon ĝi eldonis.

La lokaj aŭtoritatuloj subtenas la lingvon. Antaŭ du jaroj la urbestro de Sofio sendis salutojn al du anglaj urbestroj per esperantaj leteroj. Fama "Esperanta Ko-operativo" en la ĉefurbo posedas dek butikojn. Super ĉiu butiko jen tre bela signo "Esperanto". Tiun entreprenon plene finance subtenas la registaro. La "Konstitucio de la Respubliko" estas presita ankaŭ en la internacia lingvo. Ĉi-jare *Sub la jugo, La Bofilino* kaj celebra libro pri la "15 jaroj" (depost la revolucio) ankaŭ aperis en la Zamenhofa lingvo.

Ĉu vi iam vidis "Nuntempan *Bulgarion*", plej helan, plej belan gazeton? Ankaŭ ĝin oficiale eldonas la registaro de la respubliko.

En la bulgara nacia kongreso en Varna, Julio 1958, ĉeestis mil delegitoj. Ĉiu delegito reprezentis dek anojn de la Esperanta Asocio. Do, entute 10,000 anoj

Jam komenciĝis la kursoj por la vintra sezono. En Plovdiv, la dua urbo, kun loĝantaro de 150,000 homoj, oni havas dek kursojn, du en la klubejo, dek en fabrikejoj kaj lernejoj.

Kelkfoje la ideoj de la fervoruloj estas iome fantaziaj. Ekzemple, en du apartaj lokoj mi aŭdis pri plano por disvastigi la instruadon. Oni planis kurson por 40 geinstruistoj, ĉiu el kiuj en la sekvanta sezono instruos 40 klasanojn—do, 1,600 komencontoj!

H. G. Toms.

TRANSLATION COMPETITION 23

The effect of the privations and sufferings which he endured at this time was discernible to the last in his temper and his deportment. His manners had never been courtly. They now became almost savage. Being frequently under the necessity of wearing shabby coats and dirty shirts, he became a confirmed sloven. Being often very hungry when he sat down to his meals, he contracted a habit of eating with ravenous greediness. Even to the end of his life, and even at the tables of the great, the sight of food affected him as it affects wild beasts and birds of prey. His taste in cookery, formed in subterranean ordinaries and alamode beefshops, was far from delicate. Whenever he was so fortunate as to have near him a hare that had been kept too long, or a meat pie made with rancid butter, he gorged himself with such violence that his veins swelled, and the moisture broke out on his forehead. The affronts which his poverty emboldened stupid and low-minded men to offer to him would have broken a mean spirit into sycophancy, but made him rude even to ferocity.

From "*Samuel Johnson*"

by Thomas Babington Macaulay.

Readers are invited to translate into Esperanto the above text. Translations should be sent in an envelope marked *Traduko* and arrive at the B.E.A. Office before 21st March next. Books to be chosen from the B.E.A. Book List to the value of 10s. 6d. will be awarded to the sender of the best translation, if sufficient entries are received. The result will be announced in our May issue.

IDEO

Se vi estas Loka Re prezentanto de B.E.A., aŭ Delegito de U.E.A., ĉu vi informis la lokajn aŭtoritatojn? Multaj urboj havas informfakojn kaj la loka polica sidejo registras multajn informojn por helpi al civitanoj kaj alilandaj vizitantoj.

Zamenhofa Renkontigo de la Junularo Esperantista Brita

Gaja estis la kulmino de la Zamenhofa Jaro por la J.E.B. Nia Renkontigo en Londono—de la 11-a ĝis la 15-a de decembro—enhavis tre varian kaj interesoplenan programon. La “Kongresejo” estis la Junulgastejo en Earls Court, kie ni luis apartan ĉambron por niaj kunvenoj.

En la semajnfino partoprenis konstante varia nombro da personoj: maksimume naŭ samtempe tranoktis en la junulgastejo, sed entute pli ol tridek junuloj ĉeestis almenaŭ parton el la tuta aranĝo.

La vendreda vespero estis oficiale “interkona vespero”, sed efektive kelkaj anoj anstataŭe vizitis la Londonan Esperanto-klubon, dum la ceteraj faris aranĝojn en la junulgastejo. Sabatan matenon ni aŭdis du **prelegojn**; la unua estis duologo inter S-ro Basten, de la Londona klubo, kaj pola samideanino, pri diversaj temoj esperantistaj: ĝin sekvis ĝenerala diskuto pri la starigitaj demandoj. La alian prelegon donis F-ino Ingrid Coventry, pri la lando Belgujo, gastigonto de la venonta U.K. Posttagmeze okazis provoj de la horo kaj orkestreto por la dimanĉa Diservo, kaj preparoj por la **Kristnaska Balo**, kiu lasta bele sukcesis je la sabata vespero; ĉeestis multaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj el Londono. (La gastejestro devis longe atendi la lastan hejmen-revenanton!)

Dimanĉon matene okazis **Oratora Konkurso**, en kiu la temo estis “Londono kaj mi”. La juĝanto, S-ro Norman Smith, donis tre utilajn konsilojn al ĉiuj partoprenintoj, kaj aljuĝis la premion—ekzempleron de *Virino ĉe la Landlimo*, subskribitan de la aŭtorino—al S-ro J. C. Wells. Baldaŭ post tio sekvis festena

Kristnaska Tagmanĝo, bonguste preparita de la gasteja stabo. En la posttagmezo okazis la plej-multeĉeestita el ĉiuj aranĝoj de la semajnfino, la **Kristnaska Diservo** en la Franca Protestantanta Preĝejo. Sub la konduko de nia Prezidanto, S-ro Guy Tordoff, ĝi sekvis la tradician formon de Legajoj kaj Kristnaskaj Himnoj, kun la plezuriga pluso de la “Kristnaska Konĉerto” de Corelli. La ĉ. sepdek ĉeestintoj bone kunkantis la himnojn. La legajojn el la Biblio prezentis membroj de la J.E.B.

Dimanĉe vespere okazis **prezento de filmoj** pri la T.E.J.O.-Kunveno en Gdansk kaj la 44-a Universala Kongreso en Varsovio. Aparte por la partoprenintoj en tiuj kongresoj, estis tre interese kaj memorveke, revidi la konatajn lokojn kaj vizaĝojn sur la ekrano. Al la filmintoj, Ges-roj Green kaj S-ro John Gobourne, tutkoran dankon.

London kaj mardon okupis diversaj ekskursoj kaj vizitoj. La ĉefa interesajo de lundo estis **vizito al la Biblioteko** de B.E.A. en Kingston-on-Thames, kie ni aŭskultis bonan lekcieton de la Bibliotekisto, S-ro Butler, pri la aranĝo kaj enhavo de la Biblioteko. Longe ni emis resti inter la legindaĵoj—sed post du-tri horoj revokis nin Londono, ĉar tiuvespere okazis komuna **vizito al teatro**, multe ĝuita. Mardon matene nin gastigis la **Oficejo** de B.E.A. en Holland Park, kie volonte ni rigardis (kaj eĉ aĉetis) librojn, kaj per nia scivolemo mallhelpis al la oficejanoj labori. Posttagmeze ni vizitis al la **Planetarium**.

Nia semajnfino taŭge kulminis per partopreno en la **Zamenhofa Diskuto** ĉe la Conway Hall.



MARTHA AMY BUTLER ("AMIO,")
26 Aŭg. 1886-21 Jul. 1959
Foto en 1928 (42-jara)

"She spoke Esperanto from the first so fluently and naturally that her words were music to my ear. Many translations in the "*Kantaro Esperanta*" were inspired by her.

Also I wrote several original verses, some of which appeared at that time in various magazines under the title "Al x x x".

All our courtship and our correspondence was in Esperanto. After our marriage Esperanto continued to be the normal language of our home. For some years it was the first, and the home, language of our children. The last words she spoke to me on earth were in Esperanto.

An account of the children's early

speech appeared in "*The Esperanto Monthly*" (Aug., 1917), in the "*B.E.*" (Dec., 1918, a few sentences), and in "*Literaturo*" (Oct., 1921), the last being a detailed study of the linguistic development of a child speaking Esperanto from birth.

Amy was a perfect wife, a loving mother, a faithful friend, a true Christian. To her quiet help and encouragement behind the scenes not only I, but also our movement, owe more than ever will be known. I am grateful to the editor for inviting me to pay this tribute to her memory."

Morgaŭ

Libertempo flugas for,
Tamen kantas mia kor—
Kantas, kantas, kun obstin':
Morgaŭ mi revidos vin.

En la frumatena glor'
Vekis min la birda ĥor';
Trilis ĝoje en kombin':
"Morgaŭ vi revidos ŝin."

Ĉio belas en ĝarden',
Helas kvazaŭ nov-Eden';
Fajfas turdo sur la pin'—
Morgaŭ mi revidos vin.

Floroj gajas en sunlum',
Ĉie ŝvebas rozparfum':
Sed interne flustras mi:
"Eĉ pli rava estas ŝi."

Feoj dancas sur razen',
Ja magia ĉiu scen'—
Tamen, mankas fereĝin'!
Morgaŭ mi revidos ŝin.

Meze de somera bel'
Pinoj volbas al ĉiel';
Ĉio nur pensigas min:
"Morgaŭ mi revidos ŝin."

Brilu suno, brilu lun'—
Kiom tio gravas nun?
Gravas nur, ke en la fin'
Morgaŭ mi revidos vin.

M.C.B.

FROM FAR AND NEAR

Home

London: An Esperanto service will be held in the French Protestant Church, Soho Square, W.1, on 13th March, at 3.15 p.m. Mr. M. C. Butler will conduct. All will be welcome.

Bournemouth: A service will be held in *Friends' Meeting House*, Avenue Road, on 6th March, at 3.30 p.m. Mr. G. Rust will conduct.

Denton: Mr. N. Williams' excellent work for Esperanto in his school is threatened with curtailment or even cessation, if he cannot quickly find a competent teacher. "The way to Esperanto in the schools of Britain lies through the teachers. When they want to teach Esperanto, they will teach it" (for its instruction is already permitted). He has already arranged an excursion to Germany for his pupils at Whitsun.

Bristol: The Society, which looks to the future with optimism, has received considerable stimulus from visits paid by foreign Esperantists: S-ro Eizo Itoo of Japan, F-ino M. Wietrzynski of Germany, and S-ro Canko Murgin of Bulgaria. As a result their activities were amply reported in the local press.

Huddersfield: The Yorkshire Federation presented a copy of "*Angla Antologio*" to the Mayor, Mr. Louis Brook, when he attended their meeting on 12th December and addressed them in Esperanto, which he has long known.

Ruabon: Nearly 400 members of the Denbighshire Federation of Women's Institutes heard discussion on Esperanto as a means to international friendship.

Newcastle-on-Tyne: Forty members of the N.E.-Federation heard Miss M. Boulton's "Festparolado"

on Zamenhof Day in the Tyne Hotel. The next meeting will be in *Friends' Meeting House*, Bishop Auckland, at 3.30 p.m. on 12th March.

Andover: The Public Library has accepted a copy of Mr. Gething's book, "*Essential Esperanto*", for the Lending Library, as a gift from the local Society.

Southampton: Mr. George Rust gave an interesting talk on "Zamenhof kaj la Interno Ideo", when the Southern Federation celebrated the Zamenhof Centenary on 12th December, and Mrs. F. W. White, President of B.E.A., was present and cut the birthday cake.

B.B.C.: Mr. J. W. Leslie broadcast a short talk at 1.30 p.m. on 15th December (repeated at 7 p.m. in "Radio Newsreel" on 19th December) on the life of Zamenhof.

Rotary: Mr. F. Thurgood reports reviving interest in Esperanto. One of a panel of lecturers has visited several clubs. Mr. N. Williams now has the names of forty-seven Rotary Clubs in various countries which have at least one Esperantist among their members, and points out that the 3rd edition of G. A. Connor's book, "*Esperanto the World Language*", includes the names of Rotarian Esperanto Delegates. Rotarian members of U.E.A. are urged to become Fak-delegitoj.

Royal Society of Arts: The figures for examinations, 1958-59, are as follows: Stage I: 1st Class, 6; 2nd 4; failed, 6. Stage II: 1st Class, 8; 2nd, 6; failed, 4. Stage III: 1st Class, 3; 2nd, 4; failed, 1. Number of candidates: 42 (in 1957-58: 29).

F-ino J. Kajino, japana ĵurnalisto, vizitos Britujon dum Aprilo

